# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 2 Februaro, 2016

*Kara Leganto, fino de Februaro havas kelkajn menciindajn dato-revenojn. Unue, la 21an tagon de ĉi monato kalendaro de UNESKO mencias kiel Tago de Gepatra Lingvo – antaŭ multaj jaroj pereis studentoj en t.n. orienta Pakistano, defendante sian rajton parole la bengalan. Tutmonda Esperantistaro unuanime subtenas rajton de ĉiu homo parole la propran lingvon.*

*20an de Februaro en Ukrainio estas Tago de memoro pri la Herooj de Ĉiela Cento. Preĝo je ili estis verkita ĝuste antaŭ 2 jaroj: 20.02.2014, kiam speciala polico mortigis defendantojn de Majdano.*


*Nia membro kaj filozofo H. Crespo raportas pri Epikuranismo, libron pri kio li jam verkis angle kaj hispane kaj nun esperantigas. Vi trovas ankaŭ multajn interesaĵojn en ĉi numero de la bulteno.*

*Kaj – ĝis la Marto!* –La Redaktoro




## Epikuro kaj la Homaranismo Antikva

de Hiram Crespo, Epikurano



Multaj esperantistoj jam konas la homaranismon de Zamenhof, kiu estis parto de sia pracelo kaj originala ideo, kiam li kreis la lingvon internacian. Li kredis, ke la lingvo bezonis ian koron filozofian. Sed tiu filozofio neŭtrala estis tro ĝenerala kaj tro religiema por multaj francaj samideanoj, kiuj forigis ĝin.

En la mondo helenisma ekzistis kelkaj lernejoj: filozofiaj, terapiaj, popularaj (kiel la stoika kaj la skeptika), kiaj inter ili oni trovis la epikuran lernejon, kiu daŭris 700 jarojn kaj laŭ Norman DeWitt ege influis la fruan kristanan religion. Ĉe ili, oni sekvis Epikuron de Samoso, kiu studis sub Naŭsifano, kiu estis studento de Demokrito. Demokrito (kun Leŭcipo) estis la fondinto de la Skolo de l' Atomismo, kiu instruis, ke ĉio enhavas atomojn kaj vakuon. Sed Epikuro ne estis nur atomisto kaj fizikisto. Lia filozofio festis ankaŭ amikecon kaj aliajn valorojn homajn kaj sciencajn.

La epikuranoj dividis ilian intruadon en tri fakoj: la Kanono (ilia epistemologio, aŭ teorio de korekta pensado) instruas, ke oni devas ĉiam rezoni baze je l' evidenteco antaŭ siaj fakultatoj kaj sensoj. La Fiziko instruas naturon de aĵoj. La antikva fizika scienco estis tre rudimenta kompare al la nuna, sed tre progresema por sia tempo. Finfine, la tria fako estas la Etiko aŭ instruado pri scienco kaj arto de kiel vivi.

Ĉi tiu Etiko epikura iom similas al Budaismo: oni devas studadi kaj regi siajn dezirojn iamaniere, sed por Epikuro (malsame al Budho) ne ĉiu deziro estas malsato kaj malbono: por li ekzistas deziroj, kiuj estas naturaj kaj necesaj, aliaj, kiuj estas ankaŭ naturaj, sed nenecesaj, kaj aliaj, kiuj estas nek naturaj nek necesaj, sed senbazaj. Nia naturo ne permesas nin ignori la naturajn kaj necesajn dezirojn, do oni devas ilin sekvi.

La praceloj de la kelkaj tradicioj malsamas: la pracelo de stoikismo kaj budfismo estas eviti la doloron, tamen la pracelo epikura estas ne nur tio, sed ankaŭ vivi plezure kaj feliĉe.

Antikvaj materialistoj estis inter la unuaj, kiuj proponis tute sciencan kosman vidon, kaj eĉ konjektis ke ekzistis sennombraj planedoj, kelkaj el ili mem kun vivo. Fakte, la unua verkaĵo de sciencfikcio ajne skribita estis komedio de l' epikurano Luciano de Samosato titolita "Vera Historio". Li ĝin verkis je la dua jarcento de la Komuna Epoko.

La antikvaj atomistoj ankaŭ kredis je egaleco de virinoj kaj malŝatis superstiĉojn, serĉante ĉiam kialojn naturajn por fenomenoj observataj. ☞

Tiel, ili antaŭis sciencan vidpunkton kaj eĉ alportis al moderna mondo iliaj verkaĵojn: libro "The Swerve" argumentas, ke la Renesanco alvenis dank'al verko de epikurana poeto Lukrecjo titolita "Pri la naturo de aĵoj", kiu re-enkondukis teorion de l' atomo kaj la epikurajn instruaĵojn al moderna mondo.

Do, ni, la nunuloj, ege ŝuldas al epikuranoj antikvaj, sed preskaŭ neniu agnoskas: tial mi kreis la Societon de Amikoj de Epikuro, por ke nia riĉa intelekta heredajho estu denove rekonata de ĉiu.

Se vin interesas plu lernadi (angle), bonvolu viziti SocietyofEpicurus.com, NewEpicurean.com, ElementalEpicureanism.com, Epicurus.net kaj aliajn retejojn.




## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276

**23an de Februaro** – Hanso prezentas Luteranismo

**22an de Marto** – Pri moskva bardo Vlad Vysockij rakontas Araneo

......................

**26an de Junio** – Tradicia E-pikniko

*Antaŭ du jaroj, la 2an de Februaro 2014, pafistoj de la speciala polico de Ukrainio kaj Moskovio mortigis pli ol cent senarmilajn homojn – defendantoj de Majdano (vd. Saluton! 03/2014). Oni nomos viktimojn kiel Herooj de Ĉiela Cento (sur la apuda foto – 12-jara defendanto de Majdano). En la sama tago Viktor Morozov verkis kanton "Preĝo" laŭ vortoj de Andreo Panĉiŝin:*

## ✳ La Preĝo ✳ *Esperantigis Kris Long*

*Sibladis kugloj
dum fum' sieĝis.
Atakis "aglo",
Majdano preĝis.*

*Majdano preĝis,
amas' kordonis.
Pereis pluraj,
en sango dronis.*

*En sango dronis,
foradiaŭis.
Majdano preĝis,
defendo daŭris.*

*Majdano preĝis:
"Sinjor', bonvolu
la ĝustan vojon
al ni malkovri.*

*Majdano preĝis
kaj sin defendis.
Vespero streĉis
kaj nokt' atendis.*

*Majdano preĝis
la Virgulinon
prudente bremsi
kolerinklinon.*

*Majdano preĝis
Spiriton Sanktan:
post band' eĉ spiro,
eĉ spuro manku.*

*Sibladis kugloj
dum fum' sieĝis.
Atakis aglo,
Majdano preĝis.*

*Ho Sinjor', kompatu*

✳✳✳



## NASK kaj Kino-teatro-festo Denove Kune!

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) ankaŭ ĉi-jare kunigas la fortojn kun Kino-Teatro-Festo kaj invitas vin al unu el la plej elstaraj eventoj en Esperantujo!NASK – la plej longdaŭra Esperanto-kursaro en Norda Ameriko –estas unu el la plej gravaj aktivaĵoj subtenataj de ESF. Ĝi estas unika kleriga evento, kiu altiras lernantojn de ĉiuj lingvoniveloj kaj elstarajn Esperanto-instruistojn el la tuta mondo.

La kursaro en 2016, jam la trian fojon, estos sur la bela verda kampuso de la universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino. Same kiel en 2015, Kino-Teatro-Festo (KTF) okazos samtempe kun NASK, tiel ke la partoprenantoj de ambaŭ eventoj povu partopreni en la komunaj aktivaĵoj kaj vidi la finan produkton de la metiejoj de KTF. La plena programo okazos inter la 28-a de junio kaj 7-a de julio kaj la mallonga programo inter la 28-a de junio kaj 3-a de julio. Estos ankaŭ diversaj aliaj aktivecoj: esplorado de muzeoj, butikoj kaj restoracioj de la urbo, ĉio en piedira distanco de la kampuso. Ambaŭ grupoj povos partopreni la feston de la 4-a de julio, kun piroteknikaĵoj! Vizitu la retejon http://nask.esperantic.org por pli da informoj pri NASK kaj www.kotofesto.org pri KTF.